# Kongresa Libro Komuna





## LIGNANO SABBIADORO

## 5-12.08.2023

INTERGENERACIA KUNLABORO PRI EDUKADO

INSTRUI ESPERANTON EN LERNEJOJ





m_pi.AOOGABMI.REGISTRO UFFICIALE.U.0099148.20-07-2023

# Saluto de la Ministro pri Instruado Prof. Giuseppe Valditara

Tre afabla prezidanto, tre afablaj instruistoj,

Mi tre aprezas la idealon kiu subestas vian sindediĉon kiel instruistoj de Esperanto. Preter la universala lingvo mem esprimpova kaj simpla, kiun vi instruas, la valoroj kiujn Esperanto disvastigas estas fondigo de nova socio de solidareco, en kiu respekto al Naturo kaj Homaro estas solidaj kolonoj de paca estonteco.

Mi kredas, ke via projekto disvastigi la lingvon Esperanto per "30 oraj horoj" proponas la kreadon de pli profunda dialogo inter la popoloj ĉar ĝi estos esprimo de universalaj kaj komunaj valoroj, preter geografiaj aŭ tempaj limoj.

Mi esprimas profundan dankon pro la engaĝiĝo farita en tia specifa instruado kaj, certa pri la sukceso de la kongreso, mi bondeziras al vi ĉiuj fruktodonan laboron.

Prof. Giuseppe Valditara

# Saluto de Massimiliano Fedriga
# Prezidanto de Regiono Friuli Venezia Giulia




Per ĉi tiu mesaĝo ni sendas la dankon de Prezidanto Massimiliano Fedriga pro la afabla kaj bonvena invito al la inaŭguro de la Kongresoj malfermotaj en Lignano Sabbiadoro la 6-an de aŭgusto, al kiuj, kun bedaŭro, la Prezidanto informas, ke li ne povas partopreni.

Tamen la Prezidanto deziras esprimi sian koran aprezon por la laŭdinda iniciato, al kiu li bondeziras la plej vastan kaj meritatan sukceson kaj profitas por plenkore saluti.

**79a Internacia Junulara Kongreso de TEJO** kaj
**56a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**
okazs sub la aŭspicioj de
**Aŭtonoma Regiono Friuli Venezia Giulia**

REGIONE AUTONOMA
FRIULI VENEZIA GIULIA

# Saluto de la prezidanto de KKK



En mia verda vivo mi komencis agadi kiel membro, kaj poste estrarano, de TEJO, kaj nun mi ĉefe okupiĝas pri la Itala Instituto de Esperanto, kiu en mia lando prizorgas la ekzamenojn kaj rilatas kun la Ministerio pri Edukado.

Do, saluti en sama kongreso la plej gravajn tutmondajn organizojn de instruistoj kaj de junuloj esperantistaj, mi faras per aparta emocio, kaj ankaŭ kun la certeco, ke kunlaborado de tiuj ĉi du gravaj grupoj en nia movado estas ne nur bonvena, sed esenca por la estonto de nia lingva kaj kultura agado.

Konsente kun la Estraroj de la du organizoj ni decidis, ke ne temos pri du kongresoj ial samtempaj kaj samlokaj, sed pri unusola unueca aranĝo, en kiu la partoprenantoj povos frekventi kaj partopreni la iniciatojn de ambaŭ Asocioj, spekti la evoluojn kaj la debatojn unuj de la aliaj, ĝui la utilan simbiozon inter junuloj kaj instruistoj.

Mi esperas, ke tiu provo ripetiĝos en la estonteco, kaj ke tiu ĉi duobla kongreso signos fortan kunlaboron inter la du Asocioj, por la disvastigo de niaj idealoj kaj la baldaŭa tutmonda agnosko, ke Esperanto estas ne revo sed nepra bezono de la homaro, por ĝia plej ekvilibra progreso.

Bruĉjo Kasini
Prezidanto de la
KunKongresa Komitato 2023



# Saluto de la urbestro de Linjano Orsabla Laura Giorgi

La Urbo *Lignano Sabbiadoro*, kiun mi havas la honoron reprezenti, vere ĝojas bonvenigi la 79-an Internacian Junularan Kongreson kaj la 56-an Kongreson de ILEI kun iliaj partoprenantoj, alvenintaj el la tuta mondo, kunigitaj de la deziro povi komuniki per komuna lingvo, malgraŭ la malsamaj devenoj kaj naciecoj.

Grava kultura okazo, karakterizata de momentoj de amuziĝo, gvidataj vizitoj, renkontiĝoj kaj debatoj, agadoj ĉiuj utilaj por la trejnado kaj la persona kresko de ĉiu el ni, sed ankaŭ por malfermiĝo al kundivido kaj akcepto. Celoj, kiujn oni povas ankaŭ atingi per uzado de komuna lingvo, sen ia deziro anstataŭigi la ekzistantajn, kun ilia ŝarĝo je kulturoj kaj historio, sed kiel simpla deziro de unuiĝo, almenaŭ parola.

La urbestro
Laura Giorgi

**79a Internacia Junulara Kongreso de TEJO**
kaj
**56a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**
okazs sub la aŭspicioj de

URBO LIGNANO SABBIADORO

# Salutmesaĝo de la prezidanto de TEJO Albert Stalin Garrido …



Bonvenon al la 79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Post longa vojaĝo de via hejmlando vi sukcese alvenis al Lignano Sabbiadoro en nordorienta Italio. Longa plaĝo, vasta vilaĝo, bunta kulturo, granda komunumo kaj helpema teamo estos je via dispono dum unu tuta semajno.

La kongresa temo, en ĉiu senco tre trafa, estas: “Intergeneracia kunlaboro pri edukado.” Ni havas ĉi-jare la honoron vid-al-vide interagi kun niaj kolegoj ĉe la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiuj spertas pri lingva edukado kaj gvidas la ĝeneralan direkton de Esperanto-instrua agado en la tuta movado. Kun via aliĝo al la IJK vi rajtas ankaŭ partopreni en iliaj programeroj kaj spertiĝi kaj entuziasmiĝi pli pri edukado en kaj ekster esperantista kunteksto.

Ĉi tiu IJK estas, en iu senco, “eksperimento” kies sukcesan rezulton oni esperas: ĝi estas la unua, kiun plene organizas TEJO per sia propra nomo, havante kun si internacian Kongresan Komisionon de spertaj kaj pasiaj volontuloj ne nur el Italio, sed ankaŭ el pluraj kontinentoj. Ĝi ankaŭ estas la unua, kiun ni mastrumas pere de la nova reta sistemo Administra Komuna Sistemo Organiza (AKSO), pri kiu vi cetere eble iam legis, kiu faciligas mastrumadon de diversaj servoj. Per tiuj paŝoj TEJO konstante strebas plibonigi la IJK-sperton por la tutmonda junularo.

Kiel prezidanto de TEJO kaj samtempe ĉeforganizanto de la IJK, la laboro ne estis facila, sed jen: ĝuu la frukton de nia laboro, kunmetitan kaj realigitan de plurdekoj da aktivuloj kaj helpantoj el diversaj rondoj de la organizo de pluraj mondopartoj. Partoprenu en la tagaj programeroj, kunkantu dum la koncertoj kaj kulturaj prezentoj, sunumu ĉe la plaĝo, aŭ ludu sportojn en diversaj altrange ekipitaj sport-instalaĵoj. La elekto estas via.

Albert Stalin Garrido
Prezidanto de TEJO 2022-2023
Ĉeforganizanto, IJK 2023

# … kaj de la prezidonto de TEJO Tyron Surmon



Nome de la nova Estraro de TEJO 2023-2024, mi elkore salutas ĉiujn kongresanojn, kaj dankas nian internacian Kongresan Komisionon pro ĝia elstara laboro.

Kiel prezidonto, mi esperas vidi nin ĉe niaj movadaj programeroj: ekzemple, por spekti la komitatkunsidon, lerni pri la iniciatoj kaj projektoj de TEJO, kio espereble instigos al vi mem aktiviĝon kaj spertiĝon pri nia agado! Aliflanke, kiel ordinara partoprenanto, mi egale esperas vidi vin ne nur en la tagaj salonoj sed ankaŭ ĉe la plaĝo, sportejoj kaj la diskejo. Bona IJK sukcese kunigas ambaŭ de tiuj flankoj. Mi havas neniun dubon ke nia 79-a ĉi-jare en Lignano Sabbiadoro faros same.

Tyron Surmon
Novelektita Prezidonto de TEJO
(2023-2024)



# Salutmesaĝo de la ILEI-prezidanto Ahmad Mamduhi

Nedireblan ĝojon mi sentas vidante, ke niaj kongresoj repovas okazi ĉeeste – feliĉe nun plejofte eĉ kun virtualaj partoj, kio laŭ mi multe pli alirebligas niajn kunvenojn por ĉiuj mondopartoj kaj mondopartanoj.

Nia ĉijara kongres-ĉeftemo, “Instrui Esperanton en lernejoj”, rememorigas al ni unu el niaj celegoj, se ne nian ĉefcelon. Mi elkore esperas, ke dum la Kongreso diversaj aspektoj de la temo pritaktiĝos kaj rezulte de tio ni atingos al nov(ig)aj iniciatoj kaj paŝoj por pli efikaj planado kaj agado por kiel eble plej bone kaj plej frue transdoni nian valoran lingvon al la nova generacio, kiu baldaŭ regos la mondon. Mi ne dubas, ke tiuj, kiuj konscias pri la interna ideo de Esperanto kreos pli pacan mondon, for de bedaŭregindaj ĝisnunaj avidecoj, militemoj kaj konkeramoj.

Kundividi ideojn kaj spertojn ĉiam povas helpi al ektrovado de novaj strategioj kaj ag-planoj. Laŭ mi, kadre de “Instrui Esperanton en lernejoj”, ni povas diskuti kaj pri diversaj instru-metodoj lerneje kaj pri ekinstruado de nia lingvo en diverslandaj lernejoj ĉu fakultative ĉu laŭ la oficiala instruplano de la koncernaj landoj.

Probable, iniciate de kara samideano Didier Janot, kaj simile al la ĉiumonataj virtualaj sesioj de “Kunpens(ig)ado pri Esperanto en universitatoj”,

baldaŭ ni ĝuos regulajn kunsidojn ĝuste pri "Instrui Esperanton en lernejoj" sub la sama aŭ simila titolo. Plejeble dum la Kongreso ankaŭ tio pritraktiĝos kaj esperebIe la titolo, tago kaj horo de la virtualaj kunvenoj konkretiĝos. Do jen atendinda kaj atentinta antaŭfrukto de la fruktodona Kongreso!

Vere dankindas la laboroj por la ĉijara ILEI-Simpozio, kies organizanto estis/as prof. Fernando Pita, kaj kies ĉeftemo tute kompletigas tiun de la Kongreso: "Instrui – ne nur Esperanton! – ekster lernejaj medioj". Ankaŭ AMO 102, kiu okazas ĉefe dank' al klopodoj de Stefan MacGill, havas tute rilatan titolon: "Interkulturo en lernejoj". Elkoran dankon ankaŭ al ĉiuj samideaninoj kiuj vigligos per siaj kleraj prelegoj kaj interesaj kontribuoj la programon de Virina Agado, zorgate de prof. Alessandra Madella.

Kunkongresado kun TEJO donas al ambaŭ organizoj bonan sinergion – mi elkore dankas al ĉiuj, kiuj dum longaj monatoj tutkore strebis por pli bona okazigado de niaj 2023-aj kongresoj – precipe al d-ino Laura Brazzabeni, ILEI-estrarano pri kongresoj.

Ĉian bonon,

Amike kaj estime,
Ahmad Mamduhi

## Salutmesaĝo de la ILEI-estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni



Kiel estrarano pri kongresoj de ILEI kaj kiel instruistino pri fremdaj lingvoj kaj Esperanto mi bonvenigas ĉiujn por nia ĉeesta kaj reta kongreso. La plejmulto de programeroj estas spekteblaj en Zoom por la kongresanoj kiuj ne povis atingi Linjanon. La temo estas ege interesa, la programo plenplena. Mi bondeziras al ĉiuj amuzan kaj fruktodonan kongreson.

Laura Brazzabeni
estrarano pri kongresoj

# Programo

## La salonoj

| SIMBOLO | KONSTRUAĴO | NOMO | |
|---|---|---|---|
| **Z** | L | Ludoviko L. Zamenhof | |
| ❶ | L | Rogier Hurman | |
| 📖 | L | Tibor Sekelj | Libroservo |
| ❷ | L | Karlos' Pesquera Alonso | |
| **I** | 9 | Verda Majo | oficejo ILEI |
| **T** | 9 | Hector Hodler | oficejo TEJO |
| ❸ | 9 | Sara Spanò | |
| **D** | 9 | Mario kaj Catina Dazzini | klasĉambro |
| **S** | 9 | István Szerdahelyi | klasĉambro |
| **L** | 9 | Mauro La Torre | |
| ❹ | 11 | Claude Nourmont | |
| ❺ | 4 | Michael Boris Mandirola | |
| ❻ | 4 | Bui Hai Mung | |
| ❼ | 12 | Edmond Privat | |
| | P5 | Aquagiò | |
| ❽ | E | Ludejo E | |
| ❾ | A | Ludejo A | |
| | plaĝo | | |
| **H** | herbejo | | |
| 🌍 | aranĝoj hibridaj rete kunligitaj | | |

**• 2023-08-05 Sabato**

| | | |
|---|---|---|
| 09:00–21:00 | **T** | TEJO: Alveno de la kongresanoj (Kongresa Komisiono)<br>*Por registriĝi surloke kaj por komuniki al la Kongresa Komisiono ĉiujn demandojn, bezonojn, dubojn, proponojn, ktp.* |
| 10:00–21:00 | **I** | ILEI: Alveno de la kongresanoj |
| 21:00–23:00 | | Interkona Vespero<br>*La unua granda programero estas la Interkona Vespero en tre speciala versio: ĝi okazos en akvoparko! Konatiĝu, parolu, kaj ludu kun aliaj kaj frue krei tre fortajn amikecojn. Ne forgesu kunporti proprajn bankostumojn kaj bantukojn.* |
| 23:00–03:00 | **Z** | Diskejo + Trinkejo (Christine Brücker)<br>*Trinku bieron kaj dancu al la vigla, varmiga ritmo de ĉia muziko ĝis la nokto-nokto-fin'.* |
| 23:00–03:00 | ❻ | Gufujoj: Babila kaj Silenta (Vlasta Pištíková, Petr Javorik)<br>*Ĉu vi preferas pacan noktan etoson trinkante teon? Venu al la gufujo!* |
| 23:30–00:15 | ❻ | Kurso pri la litova (Severija Marija Banaitytė)<br>*Ĉi-nokte okazos kurseto de la litova lingvo. Pretiĝu por la venontjara IJK kun litovoj!* |
| 23:00–03:00 | DiskuTEJO | Homlupo + Sporz + Tabloludoj (Manuela Burghelea, David Guérin)<br>*Ĉu vi estas la homlupo? Aŭ ĉu vi volas ludi tablo- kaj kartludojn? Venu al la diskutejo kaj eligu vian konkursemon.* |

## • 2023-08-06 Dimanĉo

| | | |
|---|---|---|
| 07:30–08:30 | **H** | Ĉigongo (Nan Matthias-Wang)<br>*Ni faros facilajn ekzercojn de moviĝo, spirado kaj meditado, kiuj celas fortigi vian vivenergion kaj sanon.* |
| 09:30–19:30 | **T** | TEJO: Akceptejo kaj Informpunkto (Kongresa Komisiono) |
| 09:30–11:00 | 🕮 | Libroservo malfermata |
| 09:30–10:30 | ❻ | Por unuafojaj IJK-anoj<br>*Ĉu vi partoprenos la IJK-n unuafoje? Ĉeestu ĉi tiun programeron por konatiĝi kun aliaj kongresanoj kaj kompreni kiel navigi tra kaj ĝui la plej grandan junularan eventon de la jaro. Nepre rekomendinda al unuafojaj kongresanoj.* |
| 10:30–12:00 | **Z** 🌍 | Solena Malfermo (Laura Brazzabeni, Duncan Charters, Bruĉjo Kasini, Albert Stalin Garrido, Ahmad Reza Mamduhi, Tyron Surmon)<br>*Oficiala malfermo de la komuna kongreso de TEJO kaj ILEI. Inaŭgura prelego de Prof. Duncan Charters: "Strategie kune: ILEI, TEJO, UEA".* |
| 12:00–12:30 | **Z** | Komuna foto<br>*Aliĝu al la komuna foto de nia granda rondo familia.* |
| 14:00–19:30 | 🕮 | Libroservo malfermata |
| 14:00–15:00 | ❸ | Ekkonu Litovion: Pri la litova lingvo (Aida Čižikaitė)<br>*Tio certe helpos ĝui vivon ekster IJKejo venontsomere. Vi konatiĝos kun ĉefaj trajtoj de la lingvo, ekkonos lingvosistemon.* |
| 14:00–16:00 | ❻ | Komitatkunsido de TEJO (Tobiasz Kubisiowski)<br>*Ordinara kunsido de la ĉefa decidofara organo de TEJO.* |
| 14:30–15:15 | **Z** 🌍 | Vivo de "Germanaj Specialistoj" en Soveta Unio -1946 ĝis 1958 (Emma Breuninger)<br>*Post la fino de la dua mondmilito, la venkaj potencoj (Usono, Britio, Sovetunio) tre interesiĝis pri germanaj sciencistoj. Ili venigis ilin en siajn landojn, kaj ne libervole. Tiel, la 22-an de oktobro 1946, la familio Breuninger estis vekigita fare de sovetiaj soldatoj je la 6:00 matene en sia hejmo en la sovet-okupata parto de Berlino. Oni diris al ili, ke ilia patro – Helmut Breuninger – devus labori en sia fako kiel fizikisto dum 5 jaroj en Sovetunio. La tuta familio devis translokiĝi al USSR (Patro, patrino, 2-jara filo). De la 5 jaroj fariĝis 11 jaroj kaj 3 monatoj. En tiuj jaroj, la filino – Emma Breuninger – naskiĝis en Moskvo.* |
| 15:00–17:00 | ❸ | Ĉernobil: komparo inter televidserioj kaj la Katastrofo (Martin Sedlák)<br>*Ni parolos pri Ĉernobila katastrofo, ĝiaj kialoj kaj konsekvencoj, kaj ni komparu ĝin kun la fama televidserio de HBO. Kiom fidela la televidserio estas? Kaj kiom multe estas 3,6 Rentgenoj?* |
| 15:00–18:15 | **D** | Kurso por komenc-antoj/-intoj (tago 1) (Larysa Osadchuk, Alain Delmotte)<br>*Ĉiutage okazos kurso dum du horoj kaj duono (kun paŭzo) kaj poste okazos ankaŭ duonhoro da ekzerco-praktiko per origamio.* |
| 15:15–16:00 | **Z** 🌍 | Esperanto-instruiloj en la bildkarta varbado de niaj pioniroj (James Rezende Piton)<br>*Kelkajn jarojn post la lanĉo de Esperanto, la uzado de poŝtkartoj fariĝis furora internacia kutimo. En la unuaj jardekoj, la poŝtkartoj havis plurajn funkciojn, ankaŭ en la Esperanto-Movado: krom la evidentan turisman aplikon, poŝtkartoj havis reklaman, komercan, organizan, distran, klerigan rolojn. En la reklamado pri Esperanto, Esperanto-instruistoj, instruiloj kaj la strukturo de la lingvo mem aperis sur poŝtkartoj. En tiu ĉi programero oni konatiĝos kun tiu grava instrumento por esperantistoj de nia frua movado, per vizito al specimenoj kaj prihistoriaj komentoj.* |

| | | |
|---|---|---|
| 16:00–17:00 | DiskuTEJO | Amuzega Aligator-Rondo (Neli P.)<br>*Mi kronometros kaj ĉiun 10-an minuton ni ŝanĝos la lingvon en kiu ni aligatoros ĝis kompletigi la tempon de unu horo seninterrompe.* |
| 16:00–16:45 | **Z** | Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la mondo (Mireille Grosjean)<br>*Tiu projekto naskiĝis en Eo-renkontiĝo. Mireille Grosjean evoluigis ĝin fosante el siaj instruspertoj. La centra kvalito de tiu projekto estas, ke iu persono, ne esperantisto, kapablas fari la lecionon, danke al 3×5 dokumentoj bone kaj klare ellaboritaj.* |
| 17:00–18:00 | ❸ | EkItalio! (Giovanni De Lucia)<br>*Malkovru la kongresan landon per vojaĝo inter la dudek regionoj de Italio per rigardo de iliaj kulturoj kaj tradicioj.* |
| 17:00–19:00 | ❻ | Ateliero pri Diskutfaciligado (Michael Boris Mandirola)<br>*Kiel gvidi debaton aŭ kunsidon? Kiel faciligi la interagon inter la partoprenantoj por antaŭenigi la diskuton sen ke la kunsidestro superŝutu ĉiujn per ties opinioj? Ni malkovros diversajn ilojn kaj praktikos ilin. Deviga por ĉiuj programgvidantoj.* |
| 17:00–19:00 | DiskuTEJO | Metiejo pri konstruado kaj ĵetado de bumerangoj (David Trigo Pérez)<br>*Ni klarigos, kio estas bumerangoj kaj kiel ili funkcias. Tiam ni konstruos po unu por ni mem kaj, finfine, ni lernos kiel ĵeti ĝin por ke ĝi revenu.* |
| 17:00–17:30 | **Z** | Frazeologio (Marija Jerković, Renato Corsetti)<br>*Frazeologio, kiel scienca branĉo havas longan historion. Ĝi havas rilatojn al multaj aspektoj de lingva sistemo: semantiko, morfologio, tekstolingvistiko, pragmatiko. Vortoj kaj vortumoj kiuj apartenas al la specifikeco de esperanta kulturo estas ankaŭ frazeologiaĵoj. Ili pruvas ke Esperanto vivas, ke ĝi evoluas, estas esprimiva kaj taŭga en diversaj komunikaj sferoj. En la dua parto de la prelego estos donitaj ekzemploj de la kampo de insultoj en Esperanto, kiu estas kampo multe ligata al la kulturo de la parolantaj esperantistoj.* |
| 17:30–18:15 | **Z** | Lernolibroj de Esperanto por hungaraj, rusaj, germanaj kaj italaj lernejoj (Ivano Kossey)<br>*Lernolibroj de Esperanto kiel dua fremdlingvo en lernejoj. Pretas la hungara (du lernojaroj) kaj rusa (3 lernojaroj) versio, ĝermo de la germana versio (2 lernojaroj). Nun pretigas la italan version. Ĉiu versio konsistas el lernolibro, ekzerckajero, libro por instruisto, vortareto kaj disko por komputilo. La disko estas la sama por ĉiuj lingvaj versioj kaj disponigas ĉiujn plenajn versiojn.* |
| 18:00–19:30 | ❸ | Lingva Festivalo (Ranja Robertine Jeanne d'Arc Lydie Zafinifotsy)<br>*Prezentu vian denaskan lingvon kaj instruu ĝin al aliaj. Helpu stimuli ĉies scivolemon pri diversaj lingvoj de la tuta mondo.* |
| 18:15–19:00 | **Z** | La vojo al perfektiĝo: de teorio al praktiko (Mihai Trifoi)<br>*Surbaze de la propra sperto la prezentanto priskribas sian vojon al perfektiĝo. Tio povas inspirigi la studentojn kaj junajn esperantistojn, kiuj deziras fariĝi instruistoj. La prezentado enhavas kelkajn esencajn ideojn pri: instruado en pluraj medioj kaj akirado de spertoj, pri la propra filozofio, adaptiĝo al novaj cirkonstancoj kaj la faktoroj de la sukceso survoje de teorio al praktiko. La preleganto ekzempligas la rezultojn de sia laboro montrante ankaŭ malhelpajn situaciojn kaj konkludas, ke la vojo al perfektiĝo ne povas havi plenan sukceson sen daŭra laboro kaj kunlaborado kun aliaj plispertaj samideanoj.* |
| 20:00–21:30 | **L** | "EsperOri ret-renkontiĝo" kun Larysa ĉeeste (Larysa Osadchuk, Alain Delmotte) |
| 21:30–23:00 | | Koncerto: JoMo (Jean-Marc Leclercq)<br>*Ĉu vi volas danci? Kompreneble jes, kaj ĉiuj dancos sub la viglaj ritmoj de jOmO! Ne maltrafu ĉi tiun koncerton sur la plaĝo.* |

| | | |
|---|---|---|
| 23:00–03:00 | **Z** | Latinamerika Diskejo + Trinkejo (Lucca Lanzi)<br>*Trinku bieron kaj dancu al la vigla, varmiga ritmo de latinamerika muziko ĝis la nokto-nokto-fin'.* |
| 23:00–03:00 | ❻ | Gufujoj: Babila kaj Silenta (Vlasta Pištíková, Petr Javorik)<br>*Ĉu vi preferas pacan noktan etoson trinkante teon? Venu al la gufujo!* |
| 23:00–03:00 | ❻ | Koncerto de Benĝi ("Popcerteto") (Benjamín Álvarez Rodríguez)<br>*Ĉi-nokte okazos koncerto de Benĝi, nomata "Popcerteto."* |
| 23:00–03:00 | DiskuTEJO | Homlupo + Sporz + Tabloludoj (Manuela Burghelea, David Guérin) |

## • 2023-08-07 Lundo

**Estas signitaj per ♀ la programeroj de la Virina Agado**

| | | |
|---|---|---|
| 07:30–08:30 | **H** | Ĉigongo (Nan Matthias-Wang) |
| 08:30–13:00 | **E** | Duontaga ekskurso: Udine |
| 08:30–09:30 | ♀ | Jogo (Patrizia Rivaldi)<br>*Jogo, vojo por al harmonio. Per laboro sur la korpo, ni povas retrovi tiun centron, kie menso, koro kaj spirito estas Unu. Tiun ĉi staton de integriĝo kiu estas kunnaskita, ni ĉiuj almenaŭ unufoje en la vivo spertis. Fakte, ni jam estas integritaj, sed blindigitaj de la menso kaj de la socio, ni estas forpuŝitaj for de nia vera "NI MEM". "Sen meditado, ne ekzistas paco kaj sen paco, ne ekzistas feliĉo" (Bhagavad Gita)* |
| 09:00–13:00 | 📖 | Libroservo malfermata |
| 09:15–12:30 | **D** | Kurso por komenc-antoj/-intoj (tago 2) (Larysa Osadchuk, Alain Delmotte) |
| 09:30–19:30 | **T** | TEJO: Akceptejo kaj Informpunkto (Kongresa Komisiono) |
| 09:30–12:30 | **L** 🌍 | Trejnseminario "Interkultura kompetento" projekto Erasmus KA2 (tago 1) (Laura Brazzabeni, Duncan Charters)<br>*1.1. Bonvenigo kaj enkonduko. 1.2. Interkonatiĝo. 1.3 Interkona ludo / interkultura ekzerco ("cepo de diverseco", paraj dialogoj, diskutoj e grupoj). 1.4 buŝaj raport(et)oj de ĉiuj seminarianoj, ekzemple: pri siaj spertoj kaj ekscioj el la interkona ludo, kaj pri siaj atendoj de la seminario. 1.4. La enkonduka prelego: DUNCAN CHARTERS "Interkultura komunika Kompetento". 1.5. Interaga ateliero. 1.6. Konkludoj el la unua tago.* |
| 09:30–10:00 | **Z** 🌍 | Lerneja agado inter Francio, Slovenio kaj Rusio. (Emmanuel Desbrières)<br>*Emmanuel Desbrières (kun eble Peter Grebc kaj Elena Nadikova): "Lerneja agado inter Francio, Slovenio kaj Rusio"* |
| 09:30–11:30 | ❻ | Membrokunveno de BEMI (Lars Sözüer, Christine Brücker, Maxime Thiébaut)<br>*BEMI, la Biciklista Esperantista Movado Internacia, faka asocio de TEJO, invitas vin partopreni en la ĉiuduonjara membrokunveno, kiu faras la decidojn pri la plua evoluo de nia asocio.* |
| 10:00–10:30 | **Z** 🌍♀ | Luisa Spagnoli (Cosetta Bernardi)<br>*Luisa Spagnoli (1877-1935) estis itala virino kiu ege kontribuis fondi du gravajn firmaojn kiam edzinoj estis submetataj al la edza kuratoreco, kiu fariĝis ano de administra konsilio kiam virinoj ne rajtis voĉdoni, kiu cedis al amo por pli juna viro kiam ne eblis divorci kaj kiu donacis al ni ĉiuj iom da dolĉeco.* |
| 10:00–10:45 | ❸ | Ekkonu Litovion: Litovio kaj Zamenhof (Gražina Opulskienė)<br>*Eĉ se vi ĉion scias pri La Majstro, eksciu kio ligas lin kaj landon de la venonta IJK. Eble sen ligo kun Litovio tiu lingva projekto neniam aperus por publiko?* |
| 10:00–11:00 | DiskuTEJO | Roskilde Festivalo – muziko, arto, aktivismo, libereco kaj Esperanto (Wojtek |

Oreszczuk)
*Roskilde Festivalo estas unu el la plej grandaj kaj malnovaj tiuspecaj eventoj en Eŭropo, kaj laŭ multaj – ankaŭ plej bunta kaj mojosetosa! Venu kaj aŭskultu pri la ĉi-jara festivalumado kaj kial nepre endas aliĝi al Roskilde teamo en 2024!*

10:30–11:00 **Z** 🌍♀ La eldonita Esperanta versio de la libro de Antonietta Bernardoni (Laura Barbieri, Ermanno Tarracchini)
*Membroj de la Kolektivo Bernardoni prezentas la eldonitan Esperantan tradukon.*

11:00–12:30 **H** Frisbeumado! (Tyron Surmon)
*Ludu frisbeon kun ni! Facilas lerni kaj tre amuzas. Se ni havas sufiĉe da homoj, ni ekludos 'Ultimatan Frisbeon' (specifan ludon kun apartaj reguloj, ludatan kun flugdisko), alikaze ni simple komune ĵetos kaj kaptos.*

11:00–12:30 ❸ Baĉato (Kristjan Schmidt)
*Baĉato estas muziko kaj pardanco de Dominika Respubliko. La muziko ofte temas pri amo kaj estas romantika - tamen ne estas malrapida muziko. Dum la kurso vi lernos la bazajn paŝojn kaj facilajn figurojn de la danco.*

11:00–11:30 **Z** 🌍♀ Verda Majo: japana esperantistino, kontraŭmilita, kontraŭimperiisma aktivistino (Tieko Isikawa)
*Verda Majo, vernome Hasegawa Teruko (1912-1947) estas unu el la plej bone konataj esperantistoj ne nur en Japanujo sed ankaŭ en Ĉinujo. Eklerninte Esperanton en 1932, ŝi konatiĝis dank' al Esperanto kun ĉina studento Liu Ren en Tokio kaj edziniĝis en 1936. En 1937 ŝi alvenis al Ŝanhajo kaj partoprenis en ĉiuj aktivadoj de la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Ŝi kune kun ĉinaj esperantistoj laboris por la kontraŭjapana rezistmilito moviĝante tra vasta Ĉinujo. Kiel ŝi aktivis kaj vivis en tiu severa tempo? Kial oni honoras ŝin eĉ nun?*

11:30–12:00 ❻ BEMI-Karavano al Lignano (Maxime Thiébaut)
*Ni volas montri bildojn kaj rakonti pri nia bicikla karavano.*

11:30–12:00 **Z** 🌍♀ Paola Masino (Sara Spanò)
*Paola Masino (Pisa, 20-an de majo 1908 - Romo, 27-an de julio 1989) estis itala verkistino kaj tradukistino el la franca; ŝi verkis prozon (kaj romanojn kaj rakontojn), poemojn, opertekstojn, unu teatraĵon, kreis kaj prezentis radielsendojn. Tamen, tiu ĉi plurtalenta intelektulino apartenas al la multnombra serio da forgesitaj aŭtorinoj: neniu strato estis dediĉita al ŝi, kaj nur memorŝildo ĉe la domo kie ŝi vivis kun la itala verkisto kaj kritikisto Massimo Bontempelli mencias ŝin, apud la para devizo "Nia ununura laborilo estos imagopovo". Feliĉe, nuntempe kelkaj el ŝiaj verkoj estas reeldonataj kaj oni pli kaj pli valorigas la riĉan intelektan padon de aŭtorino tro ofte memorata nur kiel "la kunulino de Bontempelli".*

12:00–12:30 ❻ Historio de vojaĝado per biciklo (Maxime Thiébaut)
*Ekde kiam ni komencis vojaĝi per biciklo, kiaj vojaĝoj kaj per kiu ekipaĵo ? Vi lernos ĉion kaj ankaŭ eble malkovros pri la fama mondvojaĝanta esperantisto Lucien Péraire.*

12:00–12:30 **Z** 🌍♀ Bonkvalita teo similas al belulino (Lin Lisha "Liŝa")
*En Ĉinio troviĝas konata verso "Bonkvalita teo similas al belulino" verkita de fama poeto Su Shi (1037-1101). Do en antikveco ĉinoj donis inan genron al teo. Kial? En la jaro 641 princino de Tang-dinastio Wencheng edziniĝis kun Srong-btsansgam-po, la reĝo de la tibeta reĝimo, kaj estas ŝi, kiu enkondukis teon en Tibeton. Kiamaniere ŝi konkrete faris la enkondukon laŭ tibetaj kondiĉoj kaj vivkutimoj de lokanoj? En la jaro 1662 portugala principo Catherine edziniĝis kun la brita reĝo Charles la Dua. Kial ŝi estis nomata te-reĝino? … Lisa prezentos la temon el kaj historiaj epizodoj kaj nunaj rakontoj de virinoj laborantaj pri teo.*

12:30–13:00 **Z** 🌍♀ Virinoj en afrikaj proverboj (Mireille Grosjean)

14:00–19:30 📖 Libroservo malfermata

| | | |
|---|---|---|
| 14:00–15:30 | **Z** | Internaciaj popoldancoj (Mon Cardona)<br>*Venu lerni kaj mem provu fari kelkajn tradiciajn popoldancojn (internaciajn).* |
| 14:00–16:00 | ❻ | Tradukado kaj komputilizita tradukado en la laboro de Esperanto-organizaĵoj (Tobiasz Kubisiowski)<br>*Esperanto-organizaĵoj plej ofte uzas almenaŭ du lingvojn en sia ĉiutaga laboro. Ĉu por interna aŭ ekstera komunikado, ofte necesas havi almenaŭ du lingvajn versiojn de la sama teksto. En tiu ĉi ateliero ni priparolos la naturon de tradukado en tiu kunteksto kaj lernos iom pri komputilizita tradukado surbaze de praktikaj ekzemploj.* |
| 14:00–16:00 | ❸ | Kreu vian unuan retejon! (Michal Matúšov)<br>*Havi organizan retejon jam delonge ne estas nure opcia. Tamen, krei plaĉan retejon de nulo, aŭ komenci prizorgi ĝin povas esti defia. Venu al tiu ĉi praktika trejnado kaj vi lernos kiel facile kaj efike krei kaj mastrumi retejojn, kiuj estas belaj kaj allogas novajn membrojn al via agado.* |
| 14:30–17:30 | **L** 🌍 | KOMITATO de ILEI |
| 15:00–18:00 | **S** | Kurso perfektiga por progresantoj (tago 1) (Alain Delmotte)<br>*Kurso por progresintoj: perfektiga pri multaj aspektoj de Esperanto. Plibonigo de la konoj pri la lingvo mem bazita sur legadoj, ludoj, rolludoj, ktp. Pritraktado de gramatikaĵoj se petita de la partoprenantoj, pligrandigo de la vortprovizo. Oni ankaŭ vidos la historion kaj la futuron de Esperanto kaj de la movado.* |
| 16:00–17:00 | ❻ | Ukrainio I: Kutimoj, tradicioj kaj historio (Svitlana Kozarenko)<br>*Venu al mia serio de kvar prelegoj pri Ukrainio kiuj tuŝas diversajn aspektojn de vivo en mia lando.* |
| 16:00–17:00 | ❸ | 60-jariĝo de la revuo Kontakto (Karina Oliveira)<br>*En 2023 la revuo Kontakto iĝas 60-jaraĝa. La programero celas atentigi la publikon pri la graveco de la revuo, priparoli ĝian historion kaj festi ĝian la 60-jariĝon.* |
| 16:00–17:00 | DiskuTEJO | Libera Aligatorejo<br>*Ĉu vi volas ekzerciĝi pri lingvoj, kiujn vi lernas aŭ lernis? Venu al aligatorejo kaj libere parolu en aliaj lingvoj (sed NE KROKODILU).* |
| 17:00–19:00 | **Z** | Junulara Movada Foiro 2023 (Arya Ferduzi)<br>*Vizitu diversajn tablojn, aŭskultu rakontojn kaj ekkonu multajn movadojn ene kaj ekster de nia Movado!* |
| 17:30–18:15 | **L** 🌍 | La 30 oraj horoj (Laura Brazzabeni, Bruĉjo Kasini, Alessandra Madella)<br>*La projekto de la 30 oraj horoj naskiĝis en Italujo danke al Itala Instituto de Esperanto kaj la itala sekcio de ILEI kaj, laŭ la laborplano de ILEI, ĝi devus esti reproponita ankaŭ eksterlande. Ni prezentos ĝian historion kaj ĝiajn perspektivojn.* |
| 18:15–19:30 | **L** 🌍 | ASEMBLEO de Itala Instituto de Esperanto<br>*Plejparte en la itala lingvo.* |
| 18:30–19:15 | ❶ | Ĉu la strukturoj kiel TEJO kaj ILEI estas bezonataj? (Mireille Grosjean)<br>*Iom skua titolo. Mi volas montri, ke por rilati kun UNESKO, kun EU, UN, ni vere bezonas tiajn strukturojn. Tio estas mia celo. Kun abunda enkonduko pri memstaraj esperantistoj, kiuj uzas la lingvon sen aliĝi al konata strukturo. Ankaŭ ili valoras kaj respektendas.* |
| 21:00–21:30 | 📖 | Libroservo malfermata |
| 21:00–23:00 | **Z** | Trinkomanĝa Nokto (Homoj de la tuta mond')<br>*"Kion ni trinku en trinkomanĝa nokt', kion ni trinku dum tuta nokt?" Manĝu kaj trinku ĉiajn bongustaĵojn de la tuta mondo. Prenu manĝaĵojn aŭ trainkaĵojn de via lando!* |

| | | |
|---|---|---|
| 23:00–00:00 | **H** | Stelspektado (Frank van Hertrooij)<br>*Kiam la suno estos subirinta ni promenos al malluma loko por kune rigardi la stelojn. Mi klarigos kiel trovi rekoneblajn konstelaciojn kaj kiel la ili moviĝas dum la nokto.* |
| 23:00–03:00 | **Z** | Multlingva Diskejo kun DĴ Kunar + Trinkejo (DĴ Kunar)<br>*Trinku bieron kaj ĝuu la multlingvan diskejon kun DĴ Kunar ĝis la nokto-nokto-fin'!* |
| 23:00–03:00 | ❻ | Gufujoj: Babila kaj Silenta (Vlasta Pištíková, Petr Javorik)<br>*Ĉu vi preferas pacan noktan etoson trinkante teon? Venu al la gufujo!* |
| 23:30–00:15 | ❻ | Kurso de la litova (Severija Marija Banaitytė) |
| 23:00–03:00 | DiskuTEJO | Homlupo + Sporz + Tabloludoj (Manuela Burghelea, David Guérin) |

## • 2023-08-08 Mardo

**Estas signitaj per ♀ la programeroj de la Virina Agado**

| | | |
|---|---|---|
| 07:30–08:30 | **H** | Ĉigongo (Nan Matthias-Wang) |
| 08:30–19:30 | **E** | Tuttaga ekskurso: Aquileia kaj Grado |
| 08:30–09:30 | ♀ | Jogo (Patrizia Rivaldi) |
| 09:00–13:00 | 📖 | Libroservo malfermata |
| 09:15–12:30 | **D** | Kurso por komenc-antoj/-intoj (tago 3) (Larysa Osadchuk, Alain Delmotte) |
| 09:30–19:30 | **T** | TEJO: Akceptejo kaj Informpunkto (Kongresa Komisiono) |
| 09:30–15:00 | **E** | Duontaga ekskurso: Marano Lagunare |
| 09:30–12:30 | **L** 🌍 | Trejnseminario "Interkultura kompetento" projekto Erasmus KA2 (tago 2) (Duncan Charters, Renato Corsetti, Viko, Unika, Gabriela)<br>*Renato Corsetti: "Kultura imperiismo: kio ghi estas, chu ankau per Esperanto?" – prelego kun sekva debato. Gabriela, Unika kaj Viko: Ateliero: kion vi farus se...* |
| 09:30–10:00 | **Z** 🌍♀ | Flagoj de la prelegantoj (Cristina Bollini) |
| 10:00–10:30 | **Z** 🌍♀ | Vivi kaj vivigi la lingvon (Monika Molnar)<br>*Esperanto-instruado en la lernejo de la Granda Ursino.* |
| 10:00–10:45 | ❻ | Ekkonu Litovion: Jara rado (Aida Čižikaitė)<br>*Ĉu vi aŭdis, ke kalendaro ĉe ĉiu popolo malsamas? Vi ekkonos la litovan, konatiĝos kun tradicioj, kutimoj, ritoj kaj festoj.* |
| 10:00–11:00 | ❸ | TEJO-anoj ĉe la Eŭropa Parlamento (Valentin Ceretto Bergerat)<br>*Pasintan junion, ĉe la Eŭropa Parlamento okazis Eŭropa Junulara Okazaĵo (EJO) kie ĉeestis delegitaro de TEJO-anoj informis junulojn el tuta Eŭropo lingva diverseco, lingvopolitiko kaj Esperanto. Malkovru kio okazis tie, profitu la okazon (re)lerni pri eŭropaj instancoj kaj venontjaraj EU-balotoj. Malkovru kiel eksterrilatas TEJO. Eble estontece kunagados ankaŭ vi?* |
| 10:30–11:00 | **Z** 🌍♀ | Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni (Ermanno Tarracchini) |
| 11:00–12:00 | ❻ | E-Movado en Malagasio (Ranja Robertine Jeanne d'Arc Lydie Zafinifotsy)<br>*Mi parolos pri la alveno de la internacia lingvo en nia lando kaj ĝia evoluo poste. Menciindos la problemoj, kiujn ni renkontas rilate al la disvastigo, la instruado kaj la praktikado de la lingvo, esperante trovi solvojn kun la partoprenantoj de la IJK.* |
| 11:00–12:30 | ❸ | Enkonduko al ĵurnalismo: bazaj principoj (Massimo Ripani)<br>*Ĉu vi interesiĝas pri ĵurnalismo? Ĉi tiu prelego prezentos la fundamentajn principojn kaj strategiojn de ĵurnalismo, ne forgesante la gravecon de la etikaj normoj. Ni esploros la vojon (kaj la ĉefajn fazojn) de la elpensado ĝis la verkado de artikoloj. Krome, ni diskutos sociajn influojn kaj komunikadon kun fotistoj, grafikistoj, kaj redaktistoj. Aliĝu al ni, por malkovri la ĉarmon de ĵurnalismo kaj kiel efike labori en ĉi tiu dinamika fako.* |

11:00–11:30 **Z** 🌍♀ "Kunlaboro donas sukcesojn… " (Malgosia Komarnicka)
*Ŝi rakontos pri eldonaĵoj, kiujn kune, esperantistinoj kaj neesperantistinoj preparis kaj eldonis. La aŭtorino prezentos 3 librojn: 1. Ekologian broŝuron: “EKO – Espero”, 2. Gvidlibron: “Promene tra Vroclavo”, 3. Libron kun legendoj: “Legendoj de ses kontinentoj”. Ĉiuj libroj estis preparitaj dulingve, pole kaj Esperante kaj eldonitaj de neesperantista medio en Vroclavo.*

11:30–12:00 **Z** 🌍♀ Flannery O’ Connor (Sara Spanò)
*“Mi pensas ke la plimulto de la homoj scias kio estas rakonto, ĝis ili sidiĝas kaj klopodas verki ĝin”. Jen unu el la plej famaj asertoj de la usona verkistino Flannery O'Connor, aŭtorino de du romanoj, de tridek du rakontoj, kaj de pluraj leteroj kaj eseoj, aparte pri kreivo kaj verkado. Ŝia vivo estis markita de malsano – kaŭzo de ŝia frua morto – kaj de neskuebla religia fido, kiu konstante orientis ŝin kaj ŝian verkadon. Sed ne nur: akompanis ŝin ankaŭ humursento, (mem)ironio kaj ridindigo de la hipokritaj kaj groteskaj kondutoj kiujn ŝi observis ĉirkaŭ si.*

12:00–13:00 **Z** 🌍♀ Debato inter afrikaj virinoj: Luktoj kaj fruktoj (Mireille Grosjean, Mioranantenaina Rasoharinaivo (Miora) Raveloharison, Lydie Rania Zafinifotsy, Hawa Diol, Fafah Rafanomezantsoa, Alexandrine Omba)
*Virinoj el diversaj horizontoj de Afriko parolos inter si pri la vivo de virinoj en afrikaj socioj. Sekvos dialogo inter ili kaj la publiko, ekzemple pri la situacio de la virino en universitato aŭ dum la studoj ĝenerale, aŭ okaze de dungiĝo*

14:00–19:30 📖 Libroservo malfermata

14:00–14:30 **Z** 🌍♀ Esperanto-instruado en ĉinaj lernejoj: estinteco, nuneco kaj estonteco (Xiaofeng (Arko) Gong)
*Jam en 1912, Profesoro Cai Yuanpei (1868-1940), unua eduka ministro de la Ĉina respubliko, ordonis ke ĉiuj instruistaj lernejoj de la lando funkciigu nedevigan Esperanto-kurson. En 1917, kiam li fariĝis estro de la Pekina Universitato, li funkciigis Esperanto-kurson en sia universitato, poste li fondis la Pekinan Esperanto-kolegion. Ni prezentos skize la historion, nunan situacion kaj problemojn de Esperanto-instruado en ĉinaj lernejoj, kaj proponos kelkajn rimedojn por la estonteca instruado en Ĉinujo.*

14:00–15:00 ❻ Raporto pri ĈJEA (Huang Zonglin)
*Mallonga enkonduko de la lastatempaj agadoj kaj venontaj planoj de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, ekzemple kion ni faris por mojosigi kaj sciigi Esperanton inter ĉinaj junuloj, ktp.*

14:00–16:00 ❸ Kreu vian unuan retejon! (Michal Matúšov)
*Havi organizan retejon jam delonge ne estas nure opcia. Tamen, krei plaĉan retejon de nulo, aŭ komenci prizorgi ĝin povas esti defia. Venu al tiu ĉi praktika trejnado kaj vi lernos kiel facile kaj efike krei kaj mastrumi retejojn, kiuj estas belaj kaj allogas novajn membrojn al via agado.*

14:30–15:00 **Z** 🌍♀ Laŭlum, dumviva prilumas (Yu Jianchao)
*2023 estas la centjara jubileo de Laŭlum, kiu forpasis en 2012. Ĉe mi estas du manuskriptoj postlasitaj de Laŭlum: ambaŭ estas lerniloj, por la studentoj specialiĝantaj pri Esperanto, kompilitaj dum lia instruado en universitato. Estas ĝojinde, ke la manuskriptoj nun fariĝas libroj dank` al eldonejo, kies direktoro estas Esperantisto, unu el la studentoj de Laŭlum.*

15:00–16:00 ❻ Materialoj aplikeblaj en la reala vivo: ĉu eblas en la instruado de Esperanto? (Arya Bhaskara Ferduzi)
*Unu de la celoj de lingvolernado estas por uzi la lingvon en la ĉiutaga vivo; kiel por transakcio en merkato, por kandidatiĝi al laboroferto, ktp. Ĉu materialoj kiuj trejnas lernantojn de Esperanto, precipe junulojn, tiucele taŭgas?*

15:00–18:00 **S** Kurso perfektiga por progresantoj (tago 2) (Alain Delmotte)

| | | |
|---|---|---|
| 15:00–15:30 | **Z** 🌍♀ | Marjorie Boulton (Anna Lowenstein)<br>*Marjorie Boulton (1924-2017) estas unu el niaj plej amataj Esperanto-verkistinoj. En ĉi tiu parolado mi mallonge prezentos ŝiajn vivon kaj verkojn.* |
| 15:30–16:00 | **Z** 🌍♀ | Tina Modotti, fotistino kaj aktivulino (Alessandra Madella)<br>*Tina Modotti naskiĝis Udine, en 1896 kaj mortis en Meksiko en 1942. Dum sia mallonga vivo, ŝi iĝis elstara fotistino, nelacigebla komunista aktivulino kaj eble la plej internacia itala virino de la komenco de la dudeka jarcento. Ŝiaj fotoj, kiuj kovras nur sep jarojn de ŝia vivo, montris la belecon kaj la orgojlon de meksikaj proletaj viroj, virinoj kaj infanoj, dum ŝia internacia agado portis ŝin lukti mondskale ĝis la fino por politikaj prizonuloj kaj kontraŭ koloniismo kaj faŝismo, en la espero je pli bona mondo.* |
| 16:00–16:30 | **Z** 🌍♀ | Unu leciono pri Esperanto: eta itala sperto (Mirella De Martini)<br>*En la jaroj 2019 kaj 2020 ŝi efektivigis en sia eksa lernejo la projekton “Unu leciono pri Esperanto por ĉiuj lernejanoj”, kiun tamen ŝi devis adapti al la kondiĉoj de tiu lernejo, krom al la nuna lerneja leĝaro.* |
| 16:00–17:00 | ❻ | Miaj movadaj spertoj en Sudameriko kaj ideoj por kreskigi la ekstereŭropan junularan movadon (Lucca Catini Lanzi)<br>*Aŭskultu mian rakonton pri miaj spertoj kun la E-movado en Sudameriko. Mi parolos pri BEJO kaj siaj ŝtataj sekcioj (JES, JEP kaj KarEJO), kaj ankaŭ pri mia universitata interŝanĝo en Ĉilio, kiam mi povis koni la junularojn de Ĉilio kaj de Argentino.* |
| 16:00–17:00 | DiskuTEJO | Libera Aligatorejo<br>*Ĉu vi volas praktiki lingvojn, kiujn vi lernas aŭ lernis? Venu al aligatorejo kaj libere parolu en aliaj lingvoj (sed NE KROKODILU).* |
| 16:00–18:00 | ❸ | Ateliero pri Diskutfaciligado (Michael Boris Mandirola)<br>*Kiel gvidi debaton aŭ kunsidon? Kiel faciligi la interagon inter la partoprenantoj por antaŭenigi la diskuton sen ke la kunsidestro superŝutu ĉiujn per ties opinioj? Ni malkovros diversajn ilojn kaj praktikos ilin. Deviga por ĉiuj programgvidantoj.* |
| 16:30–17:00 | **Z** 🌍♀ | La projekto Verden en rilato kun instruado (Vito Tornillo, Rodica Todor) |
| 17:00–18:00 | DiskuTEJO | Krei sekurajn kaj inkluzivajn spacojn (Luana Araŭjo de França)<br>*Ĉu Esperantujo kunportas la malojn de la socio aŭ estas aparta mondo? Ĉu ĝenado, diskriminacio kaj perforto estas silenta problemo en nia movado? Se vi interesiĝas pri la temo, venu al tiu konversacia rondo diskuti pri ideoj kaj proponoj por plibona interkompreno kaj inkluziveco.* |
| 17:00–18:00 | ❻ | Ukrainio II: la lingva politiko (Kozarenko Svitlana)<br>*Mi proponas 4 prelegojn pri Ukrainio kiuj tuŝas diversajn aspektojn de vivo en mia lando.* |
| 17:00–17:30 | **Z** 🌍♀ | Ludforma origamia ateliero. Instruu kaj lernu ludante (fabeloj, pupteatraĵo, kaprompiloj) (Larysa Osadchuk) |
| 17:00–18:00 | **L** | Karaokeo (Ivano Kossey)<br>*Listo de kantoj en mia prezento karaokeo: Himno de Eŭropo; La pupeto (La bambola); Domo blanka (Casa bianca); Pardonu (Manchester-Liverpool); Freneza koro (Cuore matto); Falas flava foliaro (Hull az elsárgult levél — È la fine di settembre ormai); La disiĝo (La lontananza); Miliono da rozoj; Ĉio memorigas (Non ci sarà)* |
| 17:30–18:00 | **Z** 🌍 | Homa Ĉeno e MA-GA Filmoj (Alessandra Madella, Max Garcia)<br>*Ni parolas pri la koncepto kaj la atingoj de la videa projekto "Homa Ĉeno", klarigante kiel ĝin partopreni. Ili ankaŭ prezentas la novan filmon de MA-GA Filmoj, spektebla vendredon matene.* |

| | | |
|---|---|---|
| 18:00–19:30 | ❸ | Kvizo: Ĉu vi pli bone konas Azion nun? (Albert Stalin Garrido)<br>*Daŭrigo de la furora kvizo "Kiel bone vi konas Azion?" lanĉitan en IJK 2022 en Nederlando. Ĉu vi bone konas la geografion, politikon, kaj kulturon de Azio? Grupiĝu triope kaj testu vian konon pri ĉi tiu granda kontinento. Premio azia atendas vin.* |
| 18:00–19:30 | **Z** 🌍♀ | Edukado por paco. Teatraĵo (Luiza Carol)<br>*Teatraĵo: "La eskapo", radiodramo de Luiza Carol pri la rolo de instruistoj koncerne la edukadon por paco. Tio inkluzivas (eĉ prioritatas) la rolon de infanvartistoj (ĉu familianoj ĉu aliaj plenkreskuloj) influantaj la pensmanieron de infanoj dum tre frua aĝo. "La eskapo" estas imaga epilogo por la opero "Aida" de Verdi.* |
| 18:00–19:00 | **L** 🌍 | Esperanto-agado en benina/afrika universitato (Latifou Gbadamassi)<br>*La klopodoj enkonduki la instruadon de Esperanto al pli alta nivelo komenciĝis en la lernjaro 2017-2018, kiam mi redaktis peton direktitan al la Direktoro de la nuna Nacia Alta/Supera instituto pri Industria Teknologio. La celo estis starigi tie Esperanto-klubon.* |
| 18:15–19:30 | **D** | AIKIDO: prezento (Mireille Grosjean)<br>*Per karesoj konvinki la atakanton ne ataki. Jen AIKIDO, senperforta luktarto el Japanio. La praktikado de AIKIDO estas saniga por la korpo kaj gvidas al memkono, memregado, memrespekto kaj harmoniaj kontaktoj kun la aliaj.* |
| 21:00–23:00 | | Koncerto: Ĵomart kaj Nataŝa (Ĵomart kaj Nataŝa)<br>*Ĉu vi volas (denove) enamiĝi aŭ simple danci kun via tuta korpo? Aŭskultu la serenadon de la muzika duopo Ĵomart kaj Nataŝa (Ĵ&N), kiu havas longan karieron pri kantado.* |
| 23:00–03:00 | **Z** | Afrika kaj Azia Diskejo + Trinkejo (Arya Bhaskara Ferduzi)<br>*Trinku bieron kaj dancu al la vigla, varmiga ritmo de afrika kaj azia muziko ĝis la nokto-nokto-fin'.* |
| 23:00–03:00 | ❻ | Gufujoj: Babila kaj Silenta (Vlasta Pištíková, Petr Javorik)<br>*Ĉu vi preferas pacan noktan etoson trinkante teon? Venu al la gufujo!* |
| 00:00–01:00 | ❻ | Silenta Koncerto de Emerson (Emerson)<br>*Ĉi-nokte okazos koncerto de Emerson.* |
| 23:00–03:00 | DiskuTEJO | Homlupo + Sporz + Tabloludoj (Manuela Burghelea, David Guérin) |

## • 2023-08-09 Merkredo

| | | |
|---|---|---|
| 07:30–08:30 | **H** | Ĉigongo (Nan Matthias-Wang) |
| 08:30–19:30 | **E** | Tuttaga ekskurso: Venezia kaj Murano |
| 08:30–19:00 | **E** | Tuttaga ekskurso: Triesto kaj Groto Giganta |
| 09:30–19:30 | **T** | TEJO: Akceptejo kaj Informpunkto (Kongresa Komisiono) |
| 09:30–19:30 | | Plaĝotago (Homoj de la tuta mond')<br>*Ni ripozu en la plaĝo. Ĉiukaze, estas ferio, ĉu ne?* |
| 21:30–23:00 | | Internacia Vespero (Homoj de la tuta mond', Eidmantė Lileikytė)<br>*Montru viajn talentojn dum la Internacia Vespero! Ĉu vi volas kontribui? Kontaktu Eidmante en Telegramo aŭ surloke.* |
| 23:00–03:00 | **Z** | disKEJo + Trinkejo (Jordi Calafi)<br>*Trinku bieron kaj dancu al la vigla, varmiga ritmo de muziko ĝis la nokto-nokto-fin'. Liverita al vi de Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ).* |
| 23:00–03:00 | ❻ | Gufujoj: Babila kaj Silenta (Vlasta Pištíková, Petr Javorik)<br>*Ĉu vi preferas pacan noktan etoson trinkante teon? Venu al la gufujo!* |
| 23:30–00:15 | ❻ | Kurso de la litova (Severija Marija Banaitytė) |
| 23:00–03:00 | DiskuTEJO | Homlupo + Sporz + Tabloludoj (Manuela Burghelea, David Guérin) |

## • 2023-08-10 Ĵaŭdo

**Estas signitaj per 📚 la programeroj de la Simpozio "Instrui –ne nur Esperanton!– ekster lernejaj medioj"**

| | | |
|---|---|---|
| 07:30–08:30 | **H** | Ĉigongo (Nan Matthias-Wang) |
| 08:30–09:30 | | Jogo kun Klarisa (Clarissa Sabatini)<br>*Post Patrizia, nun jen Jogo kun Klarisa.* |
| 08:30–19:00 | **E** | Tuttaga ekskurso: San Vito al Tagliamento kaj San Daniele del Friuli |
| 09:00–13:00 | 📖 | Libroservo malfermata |
| 09:00–09:30 | **Z** 🌍 | Teo, Amo kaj la Mondo (Lin Lisha "Liŝa")<br>*En Ĉinio troviĝas diraĵo signifanta: ĉiu kulturo havas propran belecon, kaj ili harmonie ekzistas kune. Tion figure montras nia projekto, la monda ekspozicio Teo, Amo Kaj La Mondo, kiu komenciĝis en 2019 kaj nun rekomenciĝis.* |
| 09:15–12:30 | **D** | Kurso por komenc-antoj/-intoj (tago 4) (Larysa Osadchuk, Alain Delmotte) |
| 09:30–19:30 | **T** | TEJO: Akceptejo kaj Informpunkto (Kongresa Komisiono) |
| 09:30–10:15 | **Z** | Filmoj pri Yunnan de reĝisorino Zheng Nanxi (Nanxi Zheng)<br>*Tri filmetoj de la ĉina reĝisorino.* |
| 09:30–12:30 | **L** 🌍 | Trejnseminario "Interkultura kompetento" projekto Erasmus KA2 (tago 3)<br>*"Afrikaj perspektivoj" kun John Magessa, Latifou Gbadamassi kaj paŭza koncerteto de Clarissa Sabatini.* |
| 10:00–10:45 | ❻ | Ekkonu Litovion: Famaj nomoj (Aida Čižikaitė)<br>*Famaj kulturagantoj de nuna kaj pasinta tempo prezntiĝos antaŭ vi, malkaŝiĝos kelkaj specifaj fenomenoj. Ĝuu kaj ĝoju.* |
| 10:00–11:00 | ❸ | IJK 2025 ekster Eŭropo? (Albert Stalin Garrido)<br>*Ni interkonsentas: iam baldaŭ la IJK devas reeliri Eŭropon, sed kien ĝi iru kaj kion ni faru? Jen forumo por plani kaj realigi prospektojn de Internacia Junulara Kongreso ekster Eŭropo.* |
| 10:30–11:15 | **Z** 🌍 | Instruado kun ukrainaj rifuĝantoj en Itala Lernejo: Spertoj, Problemoj, kaj Strategioj (Massimo Ripani)<br>*Mi, kiel itala instruisto laboranta kun ukrainaj rifuĝantoj, prezentos miajn spertojn, analizante la strukturajn problemojn de italaj lernejoj kaj praktikajn strategiojn por pli efika instruado. Aliĝu al ni, por plibonigi instruadon kaj krei inkluzivan kaj ĝojplenan lernejan spacon.* |
| 11:00–12:00 | ❻ | Lingva Rakontado: Lingvo kaj vi (Viktoria Schmidbauer)<br>*Ĉiu ĉiutage uzas (aŭ ne uzas) sian denaskan lingvon (aŭ lingvojn) kaj tiel ekhavas apartajn spertojn kaj sentojn - jen okazo por kunhavigi ilin! Venu al ĉi tiu babilrondo por aŭskulti rakontojn de parolantoj de diversaj lingvoj kaj por konsciigi pri similecoj kaj malsamecoj de niaj travivaĵoj uzante niajn lingvojn. Viaj kontribuoj estas bonvenaj: ĉiu lingvo kaj ĉiu sperto gravas!* |
| 11:00–12:30 | ❸ | Teĥnika infrastrukturo por sukcesigi organizojn (Michal Matúšov)<br>*"Diru al mi kian infrastrukturon vi havas kaj mi diros al vi kion vi povas atingi." Por longtempe atingadi bonajn rezultojn estas necesa altkvalita infrastrukturo. En tiu ĉi prelego vi lernos pri la teĥniko kiun povas uzadi via organizo por bele prezentiĝi, varbi membrojn kaj entute agadi.* |
| 11:00–12:30 | DiskuTEJO | Esperantigu viajn (vest)aĵojn! (Wojtek Oreszczuk)<br>*Dum tiu ĉi arta ateliero vi povos dekori viajn aĵojn (kiel vestaĵoj, sakoj, dorsosakoj ktp.) per specialaj farboj. Estu kreema! Por la unuaj partoprenantoj ni disdonos sakojn.* |
| 11:30–12:15 | **Z** 🌍 | Maria Skłodowska-Curie – simbolo de virina forto, determinado, liberigo kaj la |

potenco de scienco (Malgosia Komarnicka)
*Ni prezentos silueton de fama sciencistino, la unua virino, kiu gajnis dufoje Nobel-premion, Maria Skłodowska-Curie. Ni ĉefe koncentriĝos sur Maria kiel bela kaj moderna virino, edzino, patrino, fratino, filino, amikino…*

12:00–12:30 ❻ La Situacio pri Homaj Rajtoj en Pakistano (Hamza Salam)
*Mi studis la ĵurnalisom kaj ankaŭ volontulis ĉe Nacia Komisiono Pri la Homaj Rajtoj en Pakistano. Dum la 79-A IJK mi ŝatos prelegi pri la situacio de homaj rajtoj en Pakistano.*

12:15–13:00 **Z** 🌍 Fratinoj Anna kaj Helene Michelau – du artistinoj el Orienta Pruslando je la jarcentŝanĝo (Aida Čižikaité)
